# TEJO-aktuale: numero 233, 2009-12

## Somero por Esperanto en Sidnejo

Inter la 10 kaj 23 de januaro organizas la Aŭstralia Esperanto-asocio intensajn kursojn de esperanto, en la urbo Sidnejo. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/997

## www.tejo.org multlingven!

Ni bezonas tradukantojn de la TEJO-retejo. Se vi pretas traduki la paĝaron, bonvolu skribi al chuck(ĉe)tejo.org aŭ lasi mesaĝon ĉi tie skribante la jenajn informojn: http://tejo.org/eo/traduku

## Guglo festas esperanton

Okaze de la 150a datreveno de L. L. Zamenhof, je la 15a de decembro, pluraj ĉefpaĝoj de google montris apartan emblemon de Google, kun la "l" anstataŭigita kun esperanta flago.
Dekoj da naciaj guglaj ĉefapaĝoj montras tiun emblemon, inter aliaj la israela, la argentina, la hispana, la sveda, la tajvana, la japana, la slovaka, la rusa, la ĉina, la pola, la franca, la bulgara, la meksika, kaj multaj aliaj.
Klakante sur la logotipo, oni rekte havis guglajn serĉrezultojn rilate al Zamenhof aŭ al Esperanto.
Ankaŭ Wikipedia disponigis informojn ĉitiutage, en la rubriko "aktualaĵo" de nacilingvaj ĉefpaĝoj.

## June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio

Itala Esperanto-Federacio iĝas centjara. Jen kialo por partopreni ĝian kongreson kaj konstati kiom ĝi estas juna. Pri la suno ne estas problemo. Ĝi daure brilas super la strandoj inter Venecio kaj Triesto, kie oni kongresos. Precize en Lignano Sabbiadoro. La kuneco rezultas el la fakto, ke Kubo estas malproksima sed Venecio proksima. Pro seminario de Europa Esperanto-Unio, financota de la Eŭropa Komunumo, multaj europaj esperantistoj jam antaŭanoncis sian ĉeeston. Rigardu en http://italakongreso.esperantoitalia.it/ kaj aliĝu senpripense. Vi rajtas donaci ion al vi de tempo al tempo. Informoj ĉe fei ĉe esperanto.it.
La LKK

## [tejo] Kunlaboru en retprojekto de TEJO!

Ĉu vi kapablas programadi en Drupalo? Ĉu vi ŝatus kunlabori en tutmonda projekto kiu kunigos E-o-instruistojn kaj lernantojn?
TEJO transprenas la retprojekton "Monda kalendaro" (www.mondakalendaro.org) kaj volas plilarĝigi ĝian amplekson je nova dimensio: Esperanto kursoj en la mondo.
Celo: ĉiu facile k rapide trovu fizikajn Esperanto-kursojn en sia proksimeco. Instruistoj facile k rapide povu enskribi siajn kursojn.
Bezonata programado: Aldono de novaj kategorioj al la ekzista datenbazo, modifo de la aspekto.
Ĉu vi interesiĝas kunlabori? -> kontaktu la TEJO-oficejon oficejo ĉe tejo.org

## Por la Rep' - Eterne Rima (Tokio - Japanio)

Eterne Rima de pluraj monatoj aktivas en Tokio por prepari sian hiphopan albumon ... kiel elŝutebla donaco por vi ĉi tie jen la ligo por libere elŝuti la albumeton : http://www.facebook.com/l/937fe;www.mediafire.com/?zkz2dzyzzwz
Por la REP'
01 - Por La Rep' (4:06)
02 - Mia Loko (3:33)
03 - Elspezoj (3:46)
04 - Ne Lasu Ŝi Enui (3:41)
Tiu varbalbumeto anoncas la alvenon de la oficiala KD "Samideano", kiu aperos baldaŭ en 2010 ĉe VINILKOSMO.
Pluraj videoj videblas ĉe la paĝo de Eternerima ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;www.myspace.com/eternerima vidu pli ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;www.ipernity.com/blog/39007/212091 kaj ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;hiphopesperanto.blogspot.com/2009/12/ep-por-la-rep-havebla-nun.html

## Blogoj ĉe tejo.org

Se vi estas membro de TEJO, vi povas havi propran blogon ĉe tejo.org. Jen, kiel eblas ekhavi ĝin (kaj listo de la blogoj). Legu pli: http://tejo.org/eo/blogo

## Salutojn de JES kaj dankon

Mi, la redaktino de TEJO-aktuale salutas ĉiuj legantoj de JES kaj dankas por via intereso en TEJO-aktuale en 2009. Se vi havas proponojn aŭ kontribuojn vi povas kontakti min persone dum JES aŭ sendi ĝi retpoŝte al la retadreso tejo-aktuale ĉe tejo.org.

## Membriĝo por 2010

Por fariĝi membro de TEJO, oni membriĝu en Universala Esperanto-Asocio (UEA), ĉar TEJO estas ties integra parto. Vi estas en la aĝo por esti membro de TEJO, se vi aĝas malpli ol 30 jarojn (aŭ 30-jariĝas ne pli frue ol en la jaro por kiu vi membriĝas) (por ke ni sciu tion, ne forgesu indiki vian naskiĝdaton). Ankaŭ atentu, ke la kategorio MG (Membro kun Gvidlibro) ne validas por membriĝi al TEJO. En la ttt-paĝaro de UEA vi trovos la retan aliĝilon; jen rigardu la kotiztabelon por la jaro 2010 kaj detalan klarigon pri la pagmanieroj. (Se tio ne sufiĉas, bv. rigardi la ĝeneralan paĝon pri membriĝado al UEA.) Legu pli: http://tejo.org/eo/membrigho

## Venontaj renkontiĝoj

(Januaro/2010) Renkontiĝo en Brazilo por gejunuloj http://bejo.esperanto.org.br;
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

## Somero por Esperanto en Sidnejo

Inter la 10 kaj 23 de januaro organizas la Aŭstralia Esperanto-asocio intensajn kursojn de esperanto, en la urbo Sidnejo. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/997

## www.tejo.org multlingven!

Ni bezonas tradukantojn de la TEJO-retejo. Se vi pretas traduki la paĝaron, bonvolu skribi al chuck(ĉe)tejo.org aŭ lasi mesaĝon ĉi tie skribante la jenajn informojn: http://tejo.org/eo/traduku

## Guglo festas esperanton

Okaze de la 150a datreveno de L. L. Zamenhof, je la 15a de decembro, pluraj ĉefpaĝoj de google montris apartan emblemon de Google, kun la "l" anstataŭigita kun esperanta flago.
Dekoj da naciaj guglaj ĉefapaĝoj montras tiun emblemon, inter aliaj la israela, la argentina, la hispana, la sveda, la tajvana, la japana, la slovaka, la rusa, la ĉina, la pola, la franca, la bulgara, la meksika, kaj multaj aliaj.
Klakante sur la logotipo, oni rekte havis guglajn serĉrezultojn rilate al Zamenhof aŭ al Esperanto.
Ankaŭ Wikipedia disponigis informojn ĉitiutage, en la rubriko "aktualaĵo" de nacilingvaj ĉefpaĝoj.

## June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio

Itala Esperanto-Federacio iĝas centjara. Jen kialo por partopreni ĝian kongreson kaj konstati kiom ĝi estas juna. Pri la suno ne estas problemo. Ĝi daure brilas super la strandoj inter Venecio kaj Triesto, kie oni kongresos. Precize en Lignano Sabbiadoro. La kuneco rezultas el la fakto, ke Kubo estas malproksima sed Venecio proksima. Pro seminario de Europa Esperanto-Unio, financota de la Eŭropa Komunumo, multaj europaj esperantistoj jam antaŭanoncis sian ĉeeston. Rigardu en http://italakongreso.esperantoitalia.it/ kaj aliĝu senpripense. Vi rajtas donaci ion al vi de tempo al tempo. Informoj ĉe fei ĉe esperanto.it.
La LKK

## [tejo] Kunlaboru en retprojekto de TEJO!

Ĉu vi kapablas programadi en Drupalo? Ĉu vi ŝatus kunlabori en tutmonda projekto kiu kunigos E-o-instruistojn kaj lernantojn?
TEJO transprenas la retprojekton "Monda kalendaro" (www.mondakalendaro.org) kaj volas plilarĝigi ĝian amplekson je nova dimensio: Esperanto kursoj en la mondo.
Celo: ĉiu facile k rapide trovu fizikajn Esperanto-kursojn en sia proksimeco. Instruistoj facile k rapide povu enskribi siajn kursojn.
Bezonata programado: Aldono de novaj kategorioj al la ekzista datenbazo, modifo de la aspekto.
Ĉu vi interesiĝas kunlabori? -> kontaktu la TEJO-oficejon oficejo ĉe tejo.org

### Por la Rep' - Eterne Rima (Tokio - Japanio)

Eterne Rima de pluraj monatoj aktivas en Tokio por prepari sian hiphopan albumon ... kiel elŝutebla donaco por vi ĉi tie jen la ligo por libere elŝuti la albumeton : http://www.facebook.com/l/937fe;www.mediafire.com/?zkz2dzyzzwz
Por la REP'
01 - Por La Rep' (4:06)
02 - Mia Loko (3:33)
03 - Elspezoj (3:46)
04 - Ne Lasu Ŝi Enui (3:41)
Tiu varbalbumeto anoncas la alvenon de la oficiala KD "Samideano", kiu aperos baldaŭ en 2010 ĉe VINILKOSMO.
Pluraj videoj videblas ĉe la paĝo de Eternerima ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;www.myspace.com/eternerima vidu pli ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;www.ipernity.com/blog/39007/212091 kaj ĉe
http://www.facebook.com/l/937fe;hiphopesperanto.blogspot.com/2009/12/ep-por-la-rep-havebla-nun.html

### Blogoj ĉe tejo.org

Se vi estas membro de TEJO, vi povas havi propran blogon ĉe tejo.org. Jen, kiel eblas ekhavi ĝin (kaj listo de la blogoj). Legu pli: http://tejo.org/eo/blogo

### Salutojn de JES kaj dankon

Mi, la redaktino de TEJO-aktuale salutas ĉiuj legantoj de JES kaj dankas por via intereso en TEJO-aktuale en 2009. Se vi havas proponojn aŭ kontribuojn vi povas kontakti min persone dum JES aŭ sendi ĝi retpoŝte al la retadreso tejo-aktuale ĉe tejo.org.

### Membriĝo por 2010

Por fariĝi membro de TEJO, oni membriĝu en Universala Esperanto-Asocio (UEA), ĉar TEJO estas ties integra parto. Vi estas en la aĝo por esti membro de TEJO, se vi aĝas malpli ol 30 jarojn (aŭ 30-jariĝas ne pli frue ol en la jaro por kiu vi membriĝas) (por ke ni sciu tion, ne forgesu indiki vian naskiĝdaton). Ankaŭ atentu, ke la kategorio MG (Membro kun Gvidlibro) ne validas por membriĝi al TEJO. En la ttt-paĝaro de UEA vi trovos la retan aliĝilon; jen rigardu la kotiztabelon por la jaro 2010 kaj detalan klarigon pri la pagmanieroj. (Se tio ne sufiĉas, bv. rigardi la ĝeneralan paĝon pri membriĝado al UEA.) Legu pli: http://tejo.org/eo/membrigho

### Venontaj renkontiĝoj

(Januaro/2010) Renkontiĝo en Brazilo por gejunuloj http://bejo.esperanto.org.br;
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu